Matthias Claudius,

# Vinkanto de Rejn'

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Ornamu per foliaĵo la pokalon,
Trinkmalplenigu ĝin!
Eŭropo ne enhavas plue valon
Kun same bona vin'!

2. Nek Hungaruj', Polujo ĝin kreskigas,
Nek frankolanda ter',
Ni ne bezonas tiujn, nin ĝojigas
De l'Rejno la vinber'.

3. La patrolando ĝin produktas nia,
Pro tio gustas ĝi
Dolĉege, sed per forto energia
Efikas ĝi en ni.

4. Ne ĉie en germana lando tiu
Vinego kreskas, ne!
Ekzistas kelka regiono, kiu
Ne konas vinon, - ve!

5. Ekzemple, turingia la montaro
Produktas beron - ho!
Ŝajnvino estas ĝi nur, la barbaro
Ĝin kore ĝuu do!

. . .

Matthias Claudius,

# Rheinweinlied

Bekränzt mit Laub den lieben vollen Becher
|: Und trinkt ihn fröhlich leer! :|
In ganz Europia, ihr Herren Zecher,
|: Ist solch ein Wein nicht mehr. :|

2. Er kommt nicht her aus Ungarn, noch aus Polen,
|: Noch wo man franzmänn'sch spricht, :|
Da mag Sankt Veit, der Ritter, Wein sich holen,
|: Wir holen ihn da nicht. :|

3. Ihn bringt das Vaterland aus seiner Fülle,
|: Wie wär' er sonst so gut! :|
Wie wär' er sonst so edel, wäre stille
|: Und doch voll Kraft und Mut. :|

4. Er wächst nicht überall im Deutschen Reiche,
|: Und viele Berge, hört, :|
Sind, wie die weiland Kreter, faule Bäuche
|: Und nicht der Stelle wert. :|

5. Thüringens Berge, zum Exempel, bringen
|: Gewächs, sieht aus wie Wein, :|
Ist's aber nicht, man kann dabei nicht singen,
|: Dabei nicht fröhlich sein. :|

. . .

6. Nek en la Erzgebirge ajn troviĝas
Bonvino, nur metal'
En ĝiaj krudaj montoj produktiĝas
Kaj akvo en la val'.

7. Sur Blocksberg, bonkonata sorĉistejo,
Nur blovas akra vent',
Per ĝi alflugas el la diablejo
Megera kontingent'!

8. Ĉe Rejno nur kreskadas vin vino,
Benata estu ĝi!
Ĉe l'bordoj ĝin ja kreis la destino,
Por ke ĝojegu ni!

9. Nu, trinku kaj ĝojadu kun bonkoro,
Ho vivu Rejna vin'!
Ĝi dum malĝoja iu ajn vivhoro
Rekuraĝigu nin!

*Traduko de la Germana poemo "Rheinweinlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-393-775 (2007-03-25 06:55:31)*

*La esperantigon mi trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44.*

6. Im Erzgebirge dürft ihr auch nicht suchen,
|: Wenn Wein ihr finden wollt, :|
Das bringt nur Silbererz und Kobaltkuchen
|: Und etwas Lausegold. :|

7. Der Blocksberg ist der lange Herr Philister,
|: Er macht nur Wind, wie der, :|
Drum tanzen auch der Kuckuck und sein Küster
|: Auf ihm die Kreuz und Quer. :|

8. Am Rhein, am Rhein, da wachsen unsre Reben,
|: Gesegnet sei der Rhein! :|
Da wachsen sie am Ufer hin und geben
|: Uns diesen Labewein. :|

9. So trinkt ihn denn, und laßet uns allewege
|: Uns freu'n und fröhlich sein! :|
Und wüßten wir, wo jemand traurig läge,
|: Wir gäben ihm den Wein. :|

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21), publikigita 1775.*

*Arg-393-774 (2014-04-23 09:52:46)*

*Pro la melodio vidu la retejojn* http://norberto42.wordpress.com/201/03/03/matthias-claudius-rheinweinlied-analyse/ *kaj* http://de.wikisource.org/wiki/Rheinweinlied. *La kanton on povas aŭdi en* http://www.youtube.com/watch?v=vVihfjjoUjs. *La muziknotoj troviĝas en* http://www.lieder-archiv.de/rheinweinlied-notenblatt_600518.html.